*Julio-Aŭgusto 1956a, Nroj 11-12.*

# LA JUNA VIVO

T.E.J.O.

MONATA GAZETO DE „TUTMONDA ESPERANTO-JUNULAR-ORGANIZO"

*Redaktejo: S-ino E. Burgler, Spaubeek (L), stacidomo*
*Administrejo: F-ino C. van Spengen, Hilversum, Loosdrechtseweg 55*
*Ĝiro de TEJO por Nederlando: 537168 Abonprezo 3.50 ned. guld. aŭ egalvaloro*

## LA DEKDUA INTERNACIA JUNULARKUNVENO EN BÜSUM.

Sur la strando de la norda maro, en la famekonata banloko Büsum, okazos la 12-a IJK de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 1956-a.

La kotizoj estas ĉi tiuj:

**Por TEJO-anoj:**

| | 1/5/56 antaŭ | 1/7/56 antaŭ |
|---|---|---|
| 1. ĝis 18-jaraj | 36,— gm. | 41,— gm. |
| 2. ĝis 30-jaraj | 39,— gm. | 44,— gm. |
| 3. pli ol 30-jaraj | 45,— gm. | 50,— gm. |

4. Ne-TEJO-anoj pagos 5,— gm. pli, ĉar TEJO transprenis la laboron de la organizo.
5. Partoprenontoj de la ŝipekskurso al la rokinsulo Helgoland pagos 10,— gm. pli.
   La kotizo n-ro 3 estas nur por karavanestroj, amikoj de junularo, specialaj invititoj kaj geinstruistoj.

La Organiza Kongresa Komitato, kiu ĝuis varman kaj konkretan apogon de la Banloka Administracio, pretigis ĉi tiun allogan programon:

**Sabato, 28a de julio 1956**

**Interkona Vespero** (Strandhalo)
**Jazz-koncerto:** Dobrzynski-kvinteto

**Dimanĉo, 29a de julio 1956**

Katolika kaj Evangelia **Diservoj** en Esperanto
**Hisado de la flagoj** de la partoprenontaj nacioj, dume la orkestro de la Banl. Adm. ludos nian himnon.
**Solena Malfermo** (Strandhalo)
Forflugigo de multnaciaj leterkolomboj
**„Watt"-promenado kun muziko,** alparolo de Neptuno. Solena Ceremonio de la „Watt"baptado
Reiro kun ludoj kaj dancoj sur la „Watt"-o
**Elekto de la „Watt"-reĝino 1956 de Büsum**
**Kongresa Balo** (Oficiala Balejo)

**Lundo, 30a de julio 1956**

**Tuttaga** ŝipekskurso al fama rokinsulo **Helgoland** per la modernega Banloka Motorŝipo „Atlantis"

**Mardo, 31a de julio 1956**

Eventuale aŭdigo de interesaj diversnaciaj diskoj
**Ĉefa Laborkunsido.** Daŭrigo alian tagon
Renkontiĝo de la **Studentaj Esperanto-Kluboj** kun ĉiuj izolulaj esperantistaj studentoj

**Merkredo, 1a de aŭgusto 1956**
Kulturaj **prelegoj** kaj **konkurso**;
**Muzika Vespero** (Strandhalo)
**Jaŭde, 2a de aŭgusto 1956**
**Tuttaga ekskurso** tra Schlesw
Holstein
**Vendredo, 3a de aŭgusto 1956**
Malfermo de la **Internaciaj Sport-konkursoj:**
Internacia Tenisa Turniro
Internacia Turniro de Padelaj Boatoj
Internacia Stafetkurado (Svedstafeto)
Fina kuniĝo de la sportantoj (Strandhalo)
**Eŭropa Vespero,** poste **Torĉa Procesio** kaj **Granda Piroteknika Festo**
**Sabato, 4a de aŭgusto 1956**
**Solena Fermo** (Strandhalo)
Ekveturo de la oficiala IJK-karavano al la postkunveno: (41a UK en Kopenhago/Danlando)

Pli interesa igos la Kunvenon la partopreno de pluraj eminentaj personoj: la solena malfermo enhavos la festparoladon de s-ro Friedrich Kraus, kiu jam festparolis en la „Ora Kongreso" de GEA; la kulturaj prelegoj estos eksterordinare altnivelaj, kiel montras la nomoj mem de la prelegontoj: profesoro Giorgio Canuto, rektoro de la Universitato de Parma kaj prezidanto de la Itala Esperanto-Federacio („Itala studenta tradicio"), sinjoro Joel Vilkki, rektoro de la liceo de Somero kaj ĉefdelegito de UEA en Suomujo („En la nordo de Eŭropo - belega Suomio"), s-ro **Teo** Jung, redaktoro de „Heroldo de **Es**peranto" („Esperanto - mirakla **in**strumento"); gvidos la Eŭropan Vesperon d-ro Wilhelm Herrmann, prezidanto de GEA kaj estro de la poreŭropa movado.

Ĉiu partoprenanto ricevos la belan arĝentfiligranan insignon kun bildo de marstelo. La sama emblemo troviĝas sur la glumarkoj, kiuj estas mendeblaj kontraŭ 0,50 markoj por 20 ekzempleroj.

Kiel aliĝi al ĉi tiu belega manifestacio? Tute simple: sufiĉas kopii sur poŝtkarto la ĉisuban modelon de aliĝilo, aŭ ankaŭ peti de la LKK la presitan aliĝilon.

**NEPRE SKRIBU PRESLITERE!**

s-ro
s-rino
f-ino ..............................
(familia nomo)

..............................
(antaŭnomo)

..............................
(profesio en Esperanto)

..............................
(n-ro de la pasporto)

..............................
(lando en Esperanto)

..............................
(urbo)

..............................
(strato)

.................... : .................... jara
(naskiĝtago)

Mi ĝiris mian antaŭpagon antaŭ la 1/5/56 (1/7/56)
kaj pro tio pagos entute kiel ..........-jara: .......... gm.
Kiel Ne-TEJO-ano mi pagos pli (5,— gm.): .......... gm.
Mi deziras partopreni la ŝip-ekskurson
al la insulo Helgoland kaj pagos pli (10,- gm.): .......... gm.
Entute mi pagos: .......... gm.
Ĉar mi jam ĝiris la antaŭpagon la ..........-an de .......... :/. 20,— gm.
**Mi en Büsum ankoraŭ devas pagi: .......... gm.**

.............................., la ..... -an de .......... 1956 ..............................
(loko) (dato) (subskribo)

## ALIĜILO.

Mi aliĝas al la

**Internacia Junular-Kunveno de 28/7 — 4/8/56**
**en la Nordmara Banloko Büsum / Germanio**

Mi sicas, ke mia aliĝo nur validas je la antaŭpago de 20,— gm. kaj ĝiras tiun sumon al la kasistino:
s-rino Heinke Sommer, Büsum; poŝtĉekkonto: Hamburgo n-ro 19 93 44.
Mian adreson mi skribis preslitere sur la alian flankon.

Mi sendas tiun-ĉi aliĝilon:

Al la
Prezidanto de LKK
de la 12-a IJK de TEJO
s-ro Claus Ohlen
**Hamburgo 1**
Rosenallee 9 III
Germanio

.................................., la .................. 56

..................................................
(subskribo)

**NE FORGESU ALDONI INTERNACIAN RESPONDKUPONON!**
**AFRANKU NEPRE FILATELE POR NIA EKSPOZICIO.**

Kaj se vi intencas partopreni la UK-on en Kopenhago, ne timu ke la IJK perdigos al vi kelkajn aranĝojn: je la 17-a horo kaj 25 minutoj la „Nord-Express" enveturigos vin en la stacidomon de Kopenhago, kaj la partopreno en la karavano de Büsum ebligos al vi la ĝuon de rabato: la vojaĝo kostos nur 21,65 gm. (37,85 por irreveno).

Sed IJK, kiel kutime, ne devas esti nur antaŭdisponita aranĝo, kiun oni proponas al malviglaj ĉeestantoj: ĉiu junulo devas kunporti sian agemon kaj doni al la Kunveno la atmosferon de internacia Esperantista kunlaboro kaj kunamuzo. Ĉi supre Vi vidis, kiel la LKK klopodis ĉion organizi por plej bona sukceso, kaj sufiĉas nur aldoni, ke tuttage estos malfermita la akceptejo en la stacidomo apud la ŝoseo; la estraro de TEJO pretigis la tagordon por la Laborkunsido, kiu eble estas la malplej amuza parto, sed certe ne la malplej interesa de ĉiu IJK, kaj ĉi tiun jaron estos eksterordinare grava por la estonteco de la junulara movado:

Jen la tagordo

1) Raporto de la estraro pri sia laboro:
   a) aktivecoj de la Organizo dum la jaro;
   b) interrilatoj kun la orientaj landoj;
   c) financa raporto;
   ĉ) kontrolo de la kasdokumentoj;
   d) preparo de la IJK;
   e) informservo kaj interrilatoj kun UEA.
2) Eksiĝo de la Estraro.
3) Proponoj de la eksiĝinta Estraro kaj ilia pridiskuto:
   a) la estonta vojo de TEJO;
   b) specialaj komitatoj elektotaj;
   c) rajtoj pri ŝanĝoj en la regularo;
   ĉ) diversaĵoj.
4) Elekto de la nova funkciularo.
5) Vendo de la malnovaj gazetoj.
6) Diversaĵoj.

Ĉiu partoprenonto en la laborkunsido ricevos kopion de la proponoj de la Estraro. Do, vi povas diri, kio estas ankoraŭ farenda? Farenda nenio, se tiu ĉi estus simpla laborkunveno; sed

multo estas farinda por montri al ĉiuj la valoron de Esperanto por la junularo. Ekzemple, se ĉiu kongresano kunportus sialandajn diskojn aŭ sonrubandojn, la aŭdigo de la diskoj havos pli interesan kaj komunan karakteron; se ĉiu kunportus kelkajn lumbildojn aŭ simple fotojn de sia urbo, jen estus preta vera galerio da lumbildoj por ĉies intereso kaj ĉies gustoj; kiu povas, nepre kunportu sian nacian kostumon aŭ sian nacian flagon aŭ iun alian nacian aŭ lokan specialaĵon por montri ankaŭ al la ekstera publiko la internaciecon de la manifestacio. Krom la laborkunsido de TEJO kaj la fakkunveno de la Studenta Esperanto-Klubo Universitato Hamburg (malfermita por ĉiuj studentoj), povos okazi ankaŭ aliaj kunvenoj laŭ la deziroj de la partoprenontoj. Kantemaj gejunuloj povas formi ĥorojn, de samlandanoj por naciaj kantoj, de ĉiulandanoj por Esperantaj kantoj; ĉiu, kiu kapablas ludi instrumenton, povas ĝin kunporti, aŭ simple peti de la LKK, ke oni disponigu ĝin al li, kaj tiel floros internacia orkestro: ne timu, se vi ne estas jam spertulo: ankaŭ por muzikkomencantoj estos loko! Kaj, por ke la kantoj estu agrablaj al ĉiuj, vi mem povas sendi tekston kaj muzikon de tiuj, kiujn vi preferas, al la LKK: Internacia Kantaro estas pretigota por la IJK kun viaj sendaĵoj. Unu el la plej interesaj aranĝoj por la ekstera publiko estos la forflugigo de leterkolomboj, sed ĝia sukceso dependas de ĉiuj: vi povas interrilati kun vialoka leterkolomba societo por partopreno, menciante, ke partoprenas en la organizo la loka societo „Wattentaube 08757".

Kaj ĉies kunlaboro estas necesa en la konkursoj: poezia, oratora, folklora kaj sportaj. Poemojn (originalajn aŭ tradukajn) oni sendu al LKK antaŭ la 15-a de julio. La oratora konkurso okazos laŭ libere elektitaj temoj sendotaj al LKK antaŭ la 15-a de julio. La folklora konkurso atendas nur amasan partoprenon de naciaj kostumoj. Estas antaŭviditaj ĉi tiuj sportoj: teniso, stafetkuro, naĝo, padelo, manpilko, piedpilko (futbalo), sed ankaŭ aliaj estas aldoneblaj.

Do rapidu kaj kuniĝu kun la 173 samideanoj (el kiuj 16 TEJO-anoj), kiuj ĝis la 22-a de junio jam sin anoncis, tiel dividitaj: Aŭstrujo 2, Britujo 1, Danujo 12, Finnlando 13, Francujo 4, Germanujo 104, Italujo 7, Jugoslavio 2, Maroko 4, Nederlando 7, Norvegujo 10, Saarlando 1, Svedujo 3, Svisujo 3.

Kaj, se, malgraŭ la tiom malaltaj kotizoj, malgraŭ la bonegaj klopodoj de la LKK, malgraŭ la interesega programo, vi ne povos partopreni, bonvolu minimume peti de la Nordgermana Radio (adreso Norddeutscher Rundfunk, Hamburg) radiodissendon pri la IJK.

## Aliĝis ĝis la 22a de junio 1956a.

1. F-ino Helmcke Margrit, Hamburg 13, Schlüterstr. 54''', Germ. 2. Sro Siegfried Ernst August, Moers, Annastr. 1, 3. Warnsholdt, Hans Herman, Westerdeichstrich, p. Büsum. 4. Sro Nicolaisen Osvald, Hammerfest, Rypefjord, Norv. 5. Sro Ciliga, Paul, Paris V. 17, rue Dugay Trouin, Francujo. 6. Sro Conselmann, Tailfingen, U. Bachstr. 104, Germ. 7. Sro Müller Paul, Wiesbaden, Moritzstr. 29, Germ. 8. Sro Schönrich Kurt, Wiesbaden, Hallgartenstr. 10, Germ. 9. Sro Koopmans Wim, Hilversum, Vosmaerlaan 3, Ned. 10. Koopmans Benata, Hilversum, Vosmaerlaan 3. 11. Werner Bernhardt, Warnemünde, Friedr. Engels-str. 25, Germ. 12. Sro Fischer Berthold, Heide/Holst, Ostroher Weg 2. 13. Sro Eitmann Johann, Bremen, Bruchhauser Str. 2a. 14. F-ino Schau Kari, Oslo, Gange-Rolvsgt. 2 D. Norv. 15. F-ino Eberling Astrid, Nordhastedt, Fieler Damm, Germ. 16. F-ino Schmitz Renate, Dortmund Hornbruch, Löttringhauserstr. 58, Germ. 17. F-ino Hübener Brigitte, Dortmund-Hörde, Graudenzerstr. 22, Germ. 18. F-ino Sieder Hanne, Hessloch/Pfalz, Iggelheimer Str. 15, Germ. 19. Sro Storm Wilfried, Hamburg-Altona, Düppelstr. 22''', Germ. 20. Sro Reiter Heinrich, Salzburg I, 557, Aŭstrujo. 21. Sro Tewes August, Herne, Bahnhofstr. 210, Germ. 22. F-ino Engemann Hedwig, Brilon i W. Sachsenweg 6, Germ. 23. Sro Hopfenmüller Willi, Aschaffenburg, Bayernstr. 23'', Germ. 24. Sro Timmreck Heinz, Elverdissen bei Herford, Germ. 25. F-ino Skowronski Gertrud, Heidelberg, Bergheimerstr. 58, Germ. 26. Sro Laederach Werner, Zürich, Küngenmatt 31, Svisujo. 27. S-ino Laederach Martha, sama adreso. 28. F-ino Laederach Susanne, sama adreso. 29. F-ino Steppes Sieglinde, Bad Kohlgrub, Kollerstr. 50 1/3 Germ. 30. Sro Grebe Hellmut, Kirn/Nahe, Jahnstr. 12, Germ. 31. Sro Minnaja Nicola, Roma, Viale Giulio Cesare 223, It. 32. Sro Lutz Gerhard, Maikammer/Pfalz, Hartmannstr. 39 Germ. 33. F-ino Bohmhauer Marianne, Hannover, Pavillonstr. 5, Germ. 34. Sro Bocksch Helmut, Hannover, Fröbelstr. 4, Germ. 35. F-ino Militzer Elke, Heide/Holst, Johann Hinrich Fehrstr. 77, Germ. 36. Sro Herr Ludwig, Oberursel/Taunus, Kapellenstr. 32. 37. F-ino Herr Irmgard, sama adreso. 38. F-ino Kelm Aenne, Oberursel, Taunus, Glöcknerwiese 8, Germ. 39. F-ino Kraus Christel, Oberursel/Taunus, Moselstr. 9. 40. f-ino Selzer Sieglinde, Heidelberg, Bergheimerstr. 58. 41. Sro Ritthaler Manfred, Neustadt/Weinstr. Waldstr. 107. 42. Sro Faust Jozef, Aschaffenburg, Goldbacherstr. 38 A. 43. S-ino Faust Erna Maria, sama adreso. 44. Sro Faust Bruno, sama adreso. 45. S-ino Fischer Gudrun, Heide/Holst, Ostroherweg 2. 46. F-ino Kröner Heide, Heide/Holst, Robert Kochstr. 7. 47. F-ino Palinski Waltraut, Heide/Holst, Kringelkrug. 48. F-ino Dräger Brigitto, Osterade bei Heide Holst. Sro Eberspächer Kurt, Zell/Neckar, Hermannstr. 8, Germ. 50. Sro Anjer Ludwig, Oslo-Nordstrandhögda, Oberst Rodesveg 76, Norv. 51. S-ino Anjer Agneta, sama adreso. 52. F-ino Anjer Birgita, sama adreso. 53. Anjer Joĉjo, Sro, sama adreso. 54. Sro Anjer Sven, sama adreso. 55. Sro Vilkki Joel, Somero, Finnlando. 56. Sro Vilkki Simo Somero. 57. F-ino Haapanen Sirkku, Kiikala. 58. F-ino Haukkamaa Raili,

Somero. 59. Sro Keinänen Risto, Somero. 60. F-ino Kuosma Tuula, Somero. 61. F-ino Lehtinen Pirkko, Jokicinen. 62. Sro Parko Jukka, Somero. 63. F-ino Peltomäki Kaarina, Somero. 64. F-ino Seppänen Liisa, Somero. 65. F-ino Simolak Eeva, Jokicinen. 66. F-ino Takala Toini, Somerniemi. 67. S-ino Thorsen Roma, Kopenhago, Dyblandsvangen 7, Danujo. 68. Sro Thorsen Lasse, sama adreso. 69. F-ino Ott Jensen, Bente, Kopenhago, Randersgade 61/IV. 70. F-ino Erischsen Kirsten. Marie, Kopenhago, Bjortøgade 7 St. 71. F-ino Eriksen Lis, Kopenhago, Berninggade 22'. 72. F-ino Larsen Bjørneboe Lillian, Kopenhago, Silkeborggade 32". 73. F-ino Stein Lizzie, Kopenhago, Koldinggade 25". 74. F-ino Christensen Jenny, Kopenhago, Herninggade 10 St. 75. F-ino Nielsen Østerø Solveig, Kopenhago, Arhusgade 60". 76. F-ino Nielsen Inge, Kopenhago, Arhusgade 107'. 77. F-ino Christiansen Alice, Kopenhago, Jellingegade 4/4. 78. F-ino Rimmele Helga, Stuttgart N. Bücksenstr. 36, Germ. 79. Sro Esche Hans, Herne/Westf. Scharnhorststr. 9. 80. Sro Schiemann Eckhard, Braaken/Heide, ERP-Siedlung 6. 81. Sro Piccini Marcello, Genova, Giustiani 17/17 It. 82. Sro Mascke Eberhard, Volkamrode, Braunschweig, Germ. 83. F-ino Peters Ingrid, Stuttgart N. Büchsenstr. 36. 84. F-ino Töllner Helga, Hamburg-Farmsen, Bramfelder Weg 41. 85. Sro Borsboom Eduard, Den Haag, De Gheynstr. 52, Nederl. 86. Sro Brouwer Harry, Den Haag, Acaciastr. 287. 87. Sro Hayes Victor, Den Haag, Esdoornstr. 37. 88. Sro Otterpohl Hans, Herford, Annastr. 1, Germ. 89. F-ino Kieselbach Christa, Gronau, Bernhardstr. 1. 90. F-ino Grote Alwine, Gronau, Grünstr. 22. 91. F-ino Meer Karin, Gronau, Piepenpohlstr. 60. 992. F-ino Korzen Gretchen, Hamburg 19, Tegetthoffstr. 4. 93. Sro Gross Harold, stud.jur. Bonn, Immenburgstr. 21. 94. S-ino Eades Clare, Denton/Manchester, 165 Haughton Green Road, Angl. 95. Sro Brodersen Jørgen, Odense, Ny Konge Vej 41, Danujo. 96. Sro Bornemann Ludwig, stud. rer. pol. Hamburg 1, Böckmannstr. 37, Germ. 97. Sro Derz Klaus, stud. rer. pol. sama adreso. 98. Sro Witte Kurt, Pirna/Elbe, Struppener Str. E. II. 99. Sro Brosche Giso, Pirna/Elbe. Postweg 87. 100. Sro Generlich Ernst, stud., Darmstadt, Heimstättenweg 117', Germ. 101. Sro Kertzschner Manfred, Ilsenburg-Harz, Buchberg Str. 58a. 102. Sro Kröhnert Wilfried, stud. Darmstadt-Arheilgen, Lindenweg 24. 103. Sro Piétri Lucien, Méknès, Place Collet, Maroko. 104. Sro Piétri Charley, sama adreso. 105. Sino Piétri Madelaine, sama adreso. 106. Sro Sebbag Louis, sama adreso. 107. F-ino Gallay Anne Marie, Vienne, Cours de Verdun, Francujo. 108. F-ino Guillemin Michèle, Vienne, rue L. Florentin. 109. Fino Reynaud Madelaine, Vienne 24e Viala. 110. F-ino Dietrich Gieslind, cand. med. Hamburg 39, Hindenburgstr. 111, Germ. 111. Sro Stroinski Hieronymus, Bornsdorf/Leipzig, Koloniestr. 10, Germ. 112. F-ino Giesener Irmela, Braunschweig, Hauptbahnhof 6. 113. Sro Giessner Frank, sama adreso. 114. F-ino Hünerhoff Inge, Bielefeld, Finkenstr. 22. 115. Sro Jung Teo, Scheveningen, Harstenhoekweg 223, Ned. 116. S-ino Jung Agnes, sama adreso. 117. Sro Ritthaler Reinhold, Neustadt/Weinstr. Waldstr. 107, Germ. 118. Sro Becker Günther, Frankenholz, Hauptstr. 536, Saarlando. 119. F-ino Middeldorf Heinr. stud. phil. Unna/Wstf. Westring 3, Germ. 120. Sro Berwein Willi, stud. Stuttgart-Riedenberg, Parkstr. 16. 121. Sro Heyer Christian, Berlin-Halensee, Schweidnitzerstr. 9. 122. Sro

Farm Thorsten, Sundsvall, Ludvigsbergsväg 37, Svedujo. 123. S-ino Farm Olga, sama adreso. 124. Sro Farm Gunnar, sama adreso. 125. F-ino Gärtner Anne, Hamburg-Wellingsbüttel, Op de Solt 20, Germ. 126. F-ino Geil Helge, Büsum, Bahnhofstr. 25a. 127. Sro Geiss Dieter, Oberursel/Ts. Bleichstr. 4. 128. Sro Mauchert Henry, Hamburg, Sievekingsallee 186. 129. Sro Schlüter Klaus, Hamburg 6, Beim grünen Jäger 2". 130. Sro Ohlen Claus, Büsum, Schmiedestr. 1. 131. Starck Aarno, Somero, Finnlando. 132. F-ino Voss Karin, Delve, Dorstr. 79, Germ. 133. F-ino Dettmann Toni, Kiel-Elmschenhagen, Starnbergerstr. 1. 134. F-ino Horstmann Hanna, Soltau/Hann. Louis-Harmstr. 16. 135-141. rezervitaj. 142. S-ino Minnaja Carolina, Roma, Vialo Giulio Cesare 223, Italujo. 143. Sro Minnaja Carlo, sama adreso. 144. Sro Stein Aakervik, Oslo, Helgesans gt. 84, Norvegujo. 145. Sro Schwarz Oskar, Villach, Dollhopfgasse 17, Aŭstrujo. 146. Sro Prof. dro Giorgio Canuto, Parma, Ospedale Maggiore, Italujo. 147. S-ino Canuto Maria, Parma, Collegio M. Luigia 5. 148. Sro Canuto Pietro, sama adreso. 149. F-ino Rasmussen Britt, Bergen, Jomfrustien 5, Norvegujo. 150. F-ino Jørgensen Gunvor, Bergen, Jomfrustien 7. 151. Sro Kohlmorgen Ludolf, Heide/Holst, Schumacherort 23, Germ. 152. Sro Reuchlin Richard, Mannheim, T 6/18. 153-159 rezervitaj. 160. F-ino Kohlmorgen Elke, Büsum, Am Hafen 4", Germ. 161. Sro Kohlmorgen Günter, sama adreso. 162. S-ino Sommer Heinke, Büsum, Am Oland 31, Germ. 163. F-ino Müller Traute, Büsum, Friedrichstr. 16. 164. Sro Hellmann Alfred, Walsrode bei Hannover. 165. F-ino Hellmann Erika, Walsrode bei Hannover. 166. Sro Doliwa Günther, Walsrode apud Hannover. 167. Sro Kraus Friedrich, Hamburgo-Volksdorf, Wietreie 52. 168. Sro Pfütze Richard, Büsum, Otto-Johansen Str. 169. Sro Dro Herrmann Wilhelm, Lampertheim/Hessen, BürstädterStr. 3. 170. Sro Spengler Ernst, Neustadt/Weinstr. Mittelgasse 24. 171. Sro Milĉeviĉ Boriŝa, Raĉa apud Kurŝumlija, Jugoslavujo. 172. S-ino Miliĉeviĉ, sama adreso. 173. Sro Jörgenson Jürgen Christian, Flensburg, Bismarckstr. 97', Germ.

La redaktejo kun danko konfirmas la ricevon de la sekvantaj sumoj:

| | |
|---|---|
| F-ino N. Rees, Anglujo | *f* 159.30 |
| S-ino L. Giloteaux | „ 171.50 |
| S-ino L. Giloteaux | „ 178.50 |
| Ko Wallenburg | „ 200.— |
| Sro Yves Peyraut fr. 6100.— | |
| Sro G. de Vries sendis *f* 100.— el tiu sumo mi sendis al Sro M. Schmidt *f* 42,75, (kolektiĝis *f* 45.—) + afranko *f* 0.55 entute do *f* 43.30, la resto estas | „ 56.70 |
| venditaj libroj en L'Aquila antologioj: L 5400.— × *f* 0.06 = | „ 32.40 |
| kantlibroj en komisio L 3000.— (por ni 10 %) | „ 1.80 |
| Krome sendis S-ino v. Veenendaal por kotizo kaj kovertoj + papero | „ 11.— |
| Sro Vinkenberg | „ 3.— |
| Por f-ino Stojanac, Jugoslavujo, pagita | „ 3.— |
| Sro A. Schröder | „ 3.18 |
| Sro A. Andersen el Svedujo sendis | „ 16.19 |


## Enspezoj kaj elspezoj de TEJO-kaso
## de post la Hilversuma kongreso ĝis la 15a de julio 1955.

| | | |
|---|---|---|
| 1954. | | |
| 18.8. | Keller Erwin: por si kaj por Renné Zollinger Svisl. | 8.63 |
| 12.10 | de kasisto el Hvsm | 141.59 |
| 1955: | | |
| | Nevrly, Prostejov | 3.— |
| 25.1 | Sino v. Oort, Hsm. | 10.— |
| 28.1 | Rolf Brune: sumo sendita jam al Wörgl | 178.84 |
| 28.1 | Kiessling (ab.) | 3.15 |
| 10.2 | K. Kranenburg | 80.18 |
| 25.3 | TEJO-kasisto | 358.37 |
| 5.4 | Lilli Giloteaux | 150.- |
| 14.4 | Rolf Brune | 178.83 |
| 25.4 | Anneliese Wolf, Rendsburg, Ab. | 3.15 |
| 29.6 | Ned. Sekcio (parta prunto) | 100.— |
| 29.6 | kongreskotizoj por Ned. | 63.— |
| 29.6 | kotizo el Danlando de Ethel Hansen | 6.- |
| | | 1284. |

| | | |
|---|---|---|
| 24.12 | Studio Wibo (Okt. Nro) | 64.28 |
| 1955. | | 0.02 |
| 6.1 | Studio Wibo (Nov. Dec.) | 39.87 |
| 18.1 | BUMA festv. Hilversum | 13.02 |
| 24.2 | Studio Wibo (Jan. LJV) | 39.87 |
| 10.5 | Tammo Kanter: ŝuldo 10.05 - kot. 3.— | 7.07 |
| 10.5 | Muusses LJV Febr. | 147.02 |
| | amortizo | 27.85 |
| 7.7 | Muusses: Apr. LJV (9000 antaŭpr. kun papero) | 379.52 |
| 8.7 | Muusses: junio LJV | 124.02 |
| 19.7 | kongreskot. en L'.A. | 63.— |
| | pagota fakturo por julio-aŭg. LJV ± saldo por TEJO | 190.20 |
| | | 1284.74 |

(J. A. Wallenburg)
T.E.J.O. peranto por Nederlando.

Ne estas enskribitaj la sumoj destinitaj por
Sro Michel Schmidt por la IFS, Konstanz.
25-6-'56 kontrolita
B. van Moorst, revizora Komitatano.



## KORESPOND-ADRESOJ

*Ĉiu abonanto, aŭ grupo foje po jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.*

**Bulgarujo:** Sro Atanas Ĉirpanliev, 23 j. Graf Ignatiev 61, KAZANLIK, dez. kor. pri div. temoj kaj inters. bildk. gazetojn, ktp.
La Studenta Esperanta Rondo de la Sofia Ŝtata Universitato, Filologia fakultato, dez. kor. pri div. temoj. Skribu al Sro Boris Ovĉarov, str. Jontra 3, v. h. SOFIA.

**Francujo:** Sro Petro Lemoy, 32 rue de la Colline, NANCY, M- ee M. 25 j. dez. kor. kun Germ. kaj Jugoslavujo.

**Italujo:** Sro Paolo Bonomi, Via Camozzini 15, VERONA, dez. kor. kun kompetentaj sportemuloj.